

Universala Kongreso en Vieno, 2-a parto : Parolado de Ivo Lapenna
Claude Gacond, 361-a radioprelego, 1970.09.09 & 12

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni legis al vi, kion diris D-ro Franz Jonas, la prezidanto de la Aŭstria Respubliko, en sia parolado prononcita dum la inaŭgura kunveno de la 55-a Universala Kongreso en Vieno.

A.- Kvankam ni ne havas oratoran talenton, ni nin tamen permesas legi hodiaŭ kelkajn erojn el la festparolado de profesoro Ivo Lapenna, prononcita dum la sama kunveno je la dua de aŭgusto.

Cl.- D-ro Lapenna komencis sian paroladon montrante, ke la homaro, por la unua fojo, objekte kaj reale fariĝis unusola monda komunaro de popoloj kaj individuoj.

A.- Li poste turnis la rigardon de la du mil esperantistoj, kiuj lin aŭskultis, al la provoj ŝanĝi la politikan kaj juran strukturon de la mondo. Ni citas lin :

Cl.- *« Precize antaŭ 25 jaroj, la 26-an de junio 1945, dum la ferma kunsido de la Konferenco de San Francisko, estis solene subskribita la Ĉarto de UN. Kelkajn monatojn poste, en oktobro de la sama jaro, ĝi ekvalidis, kaj la 10-an de januaro 1946 je la 4-a horo posttagmeze, en la Centra Halo de la fama Westminster Palaco en Londono, komenciĝis la Unua Sesio de la Ĝenerala Asembleo en la ĉeesto de la reprezentantoj de la 51 ŝtatoj-membroj. UN eklaboris akompanata de sinceraj bondeziroj kaj grandaj esperoj de la tuta homaro ankoraŭ sanganta el miloj da apartaj, ne cikatriĝintaj vundegoj.*

A.- *Nun la Organizaĵo, kies membraro pli ol duobligis, funkcias jam 25 jarojn. En la vivo de la homaro tio verŝajne estas malpli ol unu sekundo en la meza vivo de unuopa homo. Sed same kiel tiu unu sekundo aŭ eĉ ĝia frakcio povas esti fatala por la ekzisto de individuo, tiel same 25 jaroj, aŭ eĉ multe malpli, povas esti decidaj por la homaro.*

Cl.- *Kio, do, okazis en tiuj ĉi 25 jaroj? »*

A.- Tiam D-ro Lapenna detalias la celojn de UN : organizo de la paco ; agnosko de fundamentaj homaj rajtoj, kiuj valorigas la homan personon kaj respektas la egalecon de la homoj malgraŭ la seksaj diferencoj kaj de la nacioj malgraŭ la diferencoj de iliaj grandecoj ; respekto de la devoj rezultantaj el traktatoj kaj aliaj fontoj de internacia juro ; progreso socia. Kaj D-ro Lapenna poste diras :

Cl.- *« Necesas diri, ke UN ja havis plurajn sukcesojn en diversaj sferoj, sed bedaŭrinde tute certe ne plenumis sian ĉefan kaj plej gravan taskon, nome la konservadon de internaciaj paco kaj sekureco, la establon de tia mondo, en kiu ĉiu nacio, eĉ la plej malgranda, povus vivi, progresi kaj evoluigi sian identecon en paco kaj trankvilo ; en kiu ĉiu individuo rajtus plene ĝui la fruktojn de daŭra paco ; en kiu la gigantaj rezultoj de scienco kaj teknologio estus plene utiligataj ne por produktado de ĉiam pli teruraj instrumentoj de detruado kaj eĉ de plena neniigo, sed por la bonfarto kaj feliĉo de ĉiuj.*

A.- *Dum 25 jaroj de funkciado de UN ne ekzistis unusola tago de paco en la tuta mondo. Eĉ en la nuna momento dudeko da pli aŭ malpli grandaj militoj, kiujn oni eŭfemisme nomas armitaj konfliktoj aŭ incidentoj, mortigas niajn homajn kunfratojn, detruas materiajn havaĵojn kaj dezertigas tutajn regionojn, dum milionoj plue suferas pro manko de nutraĵo, kaj vivoj de infanoj estingiĝas pro malsato.*

Cl.- *Tio ne estas mondo digna de la nomo Homo Sapiens ; certe ne la mondo de justeco, kies vizio inspiris al superhomaj oferoj dum la lasta milito.*

A.- Tio estas honto kaj krimo kontraŭ si mem, aŭ, kiel U Thant, la Ĝenerala Sekretario de UN, esprimis sin iom pli singarde : « Progreso en la direkto de justeco kaj homa solidareco serioze postrestis malantaŭ la scienca kaj teknika progreso. »

Cl.- La fakto estas, ke la homaro ankoraŭ ne trovis sociajn, politikajn kaj eĉ kulturajn instituciojn, adekvatajn al la atingoj de la scienco kaj teknologio. Subjektive, nome el morala-intelekta vidpunkto, la homaro certe ne transformiĝis en unusolan komunajn de popoloj kaj individuoj. »

A.- Kaj post tiu konstato, d-ro Lapenna reliefigas la neceson de internacia lingvo. Jen ni ree citas lin :

Cl.- « La malharmonio inter la grandiozaj atingoj de la scienco kaj teknologio unuflanke, kaj la konsiderinde postrestintaj formoj de socia-politika kunvivado aliflanke, sentiĝas ĉiam pli forte ne plu kiel nura malagrable disonanco, sed rekte kiel unu el la fundamentaj sociaj antagonismoj de la nuntempo en mondaj dimensioj.

A.- Ni, la uzantoj de la Internacia Lingvo, sentas kaj perceptas tion multe pli ol la aliaj, ĉar tiu mirinda instrumento de internacia komunikado kaj potenca rimedo de vere internacia kompreniĝo ebligas al ni konceptadi la homaron kiel unuecan tuton.

Cl.- Ĝuste tial ni donas apogon al ĉiuj sinceraj kaj honestaj klopodoj, tute egale de kiu flanko ili venas, celantaj plibonigon de internaciaj rilatoj sur kiu ajn kampo : ekonomia, socia, politika, kultura aŭ alia. [...]

A.- La antagonismo, inter la objektiva kunligiteco de la mondo kaj la foresto de subjektiva unueco, ne nur povas, sed necese devas esti solvita. Nur du vojoj eblas :

Cl.- Aŭ la kreskantaj eksplodaj tensioj kondukos al la fina katastrofo de ĉiuj, aŭ la homaro sukcesos rapidigi la procezon de sia morala-intelekta integriĝo sur pli alta ŝtupo, adaptante sian subjektivan sintenon al la objektivaj kondiĉoj, nome al la materiaj fortoj, kiujn ĝi mem kreis, sed kiujn ĝi ankoraŭ ne lernis kontroli.

A.- Superflue diri, ke por tia supera integriĝo surbaze de egaleco kaj en maksimuma libereco la utiligo kaj apliko de komuna neŭtrale homa lingvo estas unu el la plej gravaj faktoroj ; mi kuraĝas diri eĉ pli : ĝi estas la esenca antaŭkondiĉo.

Cl.- Efektive, sen la ĝeneraliĝo de la uzo de Esperanto en internaciaj rilatoj de la popoloj tia integriĝo ne estas imagebla.

A.- Ne sufiĉas nur pasive esperi, ke la homaro ekiros tiun duan vojon, la solan kiu povas turni ĝin for de la abismo antaŭ kiu ĝi troviĝas. Aldone al firma fido necesas multege da konscia kaj respondeca laboro, bazita sur sciencaj esploroj kaj analizoj de la leĝoj regantaj la homan societeton.

Cl.- En nia konkreta situacio ne sufiĉas nur konscii pri la decida rolo de komuna lingvo en la procezo de integriĝo ; nek sufiĉas nur ripoze kontentiĝi per ĉio jam kreita en la Internacia Lingvo aŭ pere de ĝi, kaj atendi, ke per si mem, tute spontane, la lingvo plue disvastiĝos kaj aŭtomate manifestos sian pozitivan funkcion. [...]

A.- Ni ĉiuj kaj ĉiuj niaj organizaĵoj devas maksimume intensigi la klopodojn, utiligante plej racie la disponeblajn homajn fortojn kaj financajn rimedojn. [...] »

Cl.- Per tiuj vortoj de D-ro Ivo Lapenna ni konkludas hodiaŭ nian prelegon.

A.- Vi aŭdis elsendon el Svislando.

Universala Kongreso en Vieno, 2-a parto : Parolado de Ivo Lapenna
Claude Gacond, 361-a radioprelego, 1970.09.09 & 12

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-